I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071    REDAKTORO: Gimelli p. I. Germano

N° 1 - 2    Januaro - Februaro 1960    10-a Jaro

## INVITO DEL CASSIERE

Si è chiuso anche l'anno solare ed ancora molti dei n/s Soci non hanno versato la quota per il 1960. Non avendo ricevuto avviso di dimissioni dovremo rinnovare e quindi pagare, alle Associazioni di cui siamo aderenti, le quote per i Soci degli anni scorsi, per cui preghiamo vivamente tutti ad inviare la quota urgentemente a mezzo del C.C.P.n°8/24094. oppure due righe di dimissioni.

VERSATE IMMEDIATAMENTE LE QUOTE SOCIALI - SOSTENETE LA NOSTRA ASSOCIAZIONE

Chi riceve il presente Informa Bulteno" e non intende riceverlo ulteriormente, e non ha interesse al Movimento Esperantista, è pregato di farlo presente alla redazione, Via Donato Creti, 61 Bologna. Grazie anticipate.

## LA 12-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

HELSINKI Finnlando, 11-a ĝis 16-a junio 1960

Adreso: Helsinginkatu 6 B 50 Helsinki - Bankkonto: 60263 PYP Pohjois-Haaga, Helsinki

Honora Prezidanto: ERKKI AALTO, Ĉefdirektoro de V.R.

Honora Komitato: R.H.OITTINEN, Ĉefdirektoro de lerneja supera administracio; J.T.KIVISTO, Helpurbestro de Helsinki; J.LENNES, Vicdirektoro de V.R., Prezidanto de la finna sekcio de FISAIC; Y.OLLILAINEN, Ĉefo de Sociala Servo de V.R.; M.VOITTI, Direktoro de Fervoja Instituto, kaj Y.KALLINEN, Instrua Konsilisto, Prez.Labor.Kleriga Ligo

KONGRESA PROGRAMO (La L.K.K. reservas la rajton ŝanĝi la programon)

| | | |
|---|---|---|
| Sabato | 11-6 | 8 h. Malfermo de la kongresejo - 20 h. Interkonatiĝa vespero. |
| Dimanĉo | 12-6 | 10 h. Solena malfermo de la Kongreso - 13 h. Fotografado<br>15 h. Urba rondveturado - Libera vespero. |
| Lundo | 13-6 | 9,30 h. Redaktora kunveno - 15 h. Terminara Kunveno - 20 h. Kultura v. |
| Mardo | 14-6 | 9,30 h. Estrara kaj delegitara kunveno - 15 h. Fakprelegoj 20 h.Filmoj |
| Merkredo | 15-6 | 9,30 h. Laborkunsido - 14 h. Laborkunsidoj - 19 h. Kongresabalo. |
| Jaŭdo | 16-6 | 7-22 h. Tuttaga ekskurso (Arĝenta Linio) |

Kongreskotizo: Kongresano, antaŭ la 1-a de marto 1400, poste 1700 Fmk. Familiano kaj pensiulo 800 Fmk. Familianoj malpli ol 15 jaraj senpage. La kongreskotizo restos posedaĵo de la L.K.K. eĉ se iu ne partoprenos. La limtago por aliĝi estas la 30-a de aprilo 1960. Bonvolu anonci vin kiel eble plej baldaŭ.

Tuttaga ekskurso: Helsinki - Aulanko (Ŝipe) Tampere - Helsinki, 1800 Fmk. por tiuj kiuj havas liberajn trajnbiletojn. La prezo inkludas veturadon, manĝaĵon dufoje, kaj alian programon dum la ekskurso. Aliĝo sen samtempa pago ne valoras. Al aliaj ekskursoj oni povas aliĝi dum la kongreso. Pluraj informoj sekvos en venonta numero.

Prezoj por Loĝejo: Unulitan ĉambron, la prezo estas ĉirkaŭ 1000 Fmk. por nokto. Dulitan ĉambron, la prezo estas ĉirkaŭ 1200 Fmk. por nokto. Amasloĝejon kun 25-35 personoj en ĉambro, 300 Fmk. por nokto. La prezoj ne inkludas matenmanĝon, nek servmonon. L.K.K. organizos komunajn manĝojn en kongresa restoracio malmultekosta. Manĝkuponoj estas aĉeteblaj en antaŭtago ĉe la restoracio.

La L.K.K.

INFORMAZIONI PER GLI ITALIANI: Tutti coloro che intendono intervenire al Congresso di Helsinki possono inviare la loro adesione, accompagnata dal relativo importo al Segretario Gimelli Germano Via Donato Creti, 61 Bologna (C.C.P.n°8/24094) che si è assunto le funzioni di "peranto" per l'Italia. Questi non trasmetterà al L.K.K.in Helsinki l'aliĝilo" se non riceverà come sopra detto, le quote di adesione al Congresso in ragione di £. 2 per ogni Marco Finlandese, salvo conguaglio se vi sarà sensibile differenza.L'aliĝilo" potrà anche essere trasmesso direttamente al L.K.K. Helsinginkatu 6 B 50 Helsinki (Finnlando), ma deve essere sempre accompagnato dal relativo importo delle quote di adesione stabilite in Marchi Finlandesi 1700 (£. 3400) per il Congressista e Fmk. 800 (£.1600) per familiari e pensionati.

Chi invierà l'Aliĝilo" ed il relativo importo prima del 1° marzo 1960 godrà del ribasso di Fmk. 300 (£. 600). Attenzione che il limite di tempo per l'accettazione delle adesioni è il 30 aprile 1960. Si raccomanda la massima precisione nella compilazione dell'aliĝilo".

## 45-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

BRUSELO (Belgujo) - 30.VII - 6.VIII 1960 - Telegramoj: Esperanto Bruselo.

SUB LA ALTA PROTEKTADO DE L.M. BAŬDUINO, REĜO DE LA BELGOJ

Honora komitato: La honora komitato de la 45-a Universala Kongreso de Esperanto estas formita el jenaj personoj: Alta protektanto: Lia Moŝto Baŭduino, Reĝo de Bel.
Membroj: S-ro Paul Struye, Prezidanto de la Senato
Barono Kronacker, Prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj
S-ro Gaston Eyskens, Ĉefministro
Ŝtatministro Camille Huysmans, Prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj
Ŝtatministro Frans Van Gauwelaert, Prezidinto de la Ĉambro de Deputitoj
Ŝtatministro Achille Van Acker, estinta Ĉefministro
S-ro Charles Maureaux, Ministro pri Publika Instruado
S-ro P.W. Segers, Ministro pri Komunikadoj
S-ro Pierre Halmel, Ministro pri Kulturaj Aferoj
S-ro J. de Néeff, Provincestro de Brabanto
S-ro Louis Cooremans, deputito, Urbestro de Bruselo.

Kongresaj ekskursoj: La L.K.K. decidis ke la tuta tago ĵaŭdo la 4-an de augusto, estu dediĉita al tri samtempaj tuttagaj ekskursoj, kiuj celos al:
1 - Mezepoka Bruĝo kaj sunoplena marbordo 2 - Mondhavena Antverpeno kaj ŝipekskurso sur la Skeldo 3 - Ardenaj montoj kaj la Kvin Valoj.

T.E.J.O.-kongreso: La L.K.K. donis sian aŭspicion al la 16-a Junulara Kongreso de TEJO, kiu okazos en Rotterdam de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1960. D-ro W. DREES, estinta ĉefministro kaj nuna Honora Ministro de Nederlando akceptis esti Honora Protektanto de tiu kongreso.

Kongresejo: La Kongresejo de la 45-a Universala Kongreso estos la tuta nova Palaco de Kongresoj de Bruselo, kiu situas sur la monteto de Belaj Artoj je 100 m. de la centra stacidomo en la koro de la urbo.En la kongresejo troviĝas modernaj kaj funkcicelaj salonoj por la kongresaj servoj kaj laboroj, kafejo restoracio kaj poŝtoficejo. Antaŭ la konstruaĵo etendiĝas plaĉa ripoziga parketo gracje ornamita per artaj akvoŝprucoj. G.C. Fighiera - Konstanta Kongresa Sekretario

## INTERNACIA FERIO - SEMAJNO SUR HERZBERG APUD AARAU SVISLANDO

Svislando vokas vin denove! De la 20-a ĝis la 26-a de junio 1960

Vi ekskursos sur la JURAO (montaro), tra la altebenaĵo svisa kaj en la koron de la Berna Oberlando (juvelo de la Alpoj). Kasteloj malnovaj, romanaj ruinoj, famaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj en mezepokaj monaĥejoj same kiel novaj kaj malnovaj svisaj urbetoj estos esploritaj. Elektraj fervojoj, vapor- kaj motorŝipoj alterne kun aŭtobusoj, ja eĉ dentradfervojoj transportos vin. Neimageble bela estas la elvido de la FERIODOMO HERZBERG! Prezo Fr.S.90 (pagenda ĉe alveno) por pensione kaj ekskursoj. Organiza adreso: Hans HUNKELER, Trajnĉefo, Girixweg 31 AARAU (Svislando).

# ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 Roma (Italujo)
La dissendoj okazas de h.18,55 ĝis h.19,10 (M.E.T.). Ondlongoj: metroj 30,90 = Mc/s. 9,71; metroj 41,24 = Mc/s. 7,27 kaj metroj 50,34 = Mc/s. 5,96
Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA merkrede: S-ro Luigi Minnaja kaj vendrede: Prof. D-ro Vincenzo Musella
DISSENDOJ EN ESPERANTO - JARO 1960 - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto
FEBRUARO 1960-a - Mardon la 2-an: Tra la literaturo - vendredon la 5-an: Olimpikaj poetoj: Pindaro - mardon la 9-an: Cortina d'Ampezzo, la urbo de la 31-a Itala Kongreso de Esperanto - vendredon la 12-an: Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 16-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 19-an: Novaĵoj el Italujo - mardon la 23-an: Italujo kaj fremdaj verkistoj: John Keats - vendredon la 26-an: Itala kaj universala literaturo.
MARTO 1960-a - Mardon la 1-an: Tra la literaturo - vendredon la 4-an: Italaj famaj ciklistoj: Fausto Coppi - mardon la 8-an: Grandaj Sanktuloj: Sankta Johano de Dio - vendredon la 11-an: Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 15-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 18-an: Novaĵoj el Italujo - mardon la 22-an: Italaj verkistoj: Sibilla Aleramo - vendredon la 25-an: Italujo kaj fremdaj komponistoj: F. Chopin - mardon la 29-an: Historio de la itala teatro.

La Fakestro: L. MINNAJA

PAROLAS VARSOVIO . .POLA RADIO, ESPERANTAJ DISAŬDIGOJ, VARSOVIO, Pollando
Radio Varsovio disaŭdigas ĉiutage de la h.16,30 ĝis la 17 h. (M.E.T.), duonhoran programon en esperanto sur la jenaj ondoj: mallongaj: metroj 25,39 (11815 kc/s) 30,69 (9775 kc/s) 31,45 (9540 kc/s) 31,50 (9525 kc/s) 41,01 (7315 kc/s) 42,11 (7125 kc/s) 50,42 (5950 kc/s) kaj sur la meza 249 metroj (1205 kc/s)
PROGRAMO DE LA ELSENDOJ EN ESPERANTO ĝis la 15-a de aprilo 1960
LUNDE: Felietono pri politika, socia, ekonomia kaj kultura temo. Scienca tribuno
MARDE: Vortmuzika elsendo prezentata polan muzikon kaj muzikistojn
MERKREDO: Kultura kroniko kaj Koncerto kun bondeziroj
ĴAŬDE: Komentario de Observanto pri aktualaj temoj kaj leterkesto, en kiu la Redakcio respondas al leteroj de aŭskultantoj
Vendrede: Literatura rubriko. Vi trovos en ĝi fragmentojn el la esperanta literaturo originala kaj tradukita kiel ankaŭ eseojn pri literaturaj temoj
SABATE: Sonrevuo - La semajno en Pollando, kiu entenas sonraportojn pri tutpollandaj okazintaĵoj en la koncerna semajno
DIMANĈE: La panoramo de internaciaj eventoj en la Koncerna semajno kaj esperantista magazino "Sub la verda stelo", en kiu vi povas trovi novaĵojn el la tuta Esperantajo, intervjuojn, recenzojn, esperantajn kanzonojn k.t.p.
Krom tio ĉiutage novaĵoj el Pollando kaj el la mondo.

RADIO SOFIA - DISAŬDIGOJ EN ESPERANTO, SOFIA, Bulgario - ĈIUDIMANĈE de la h. 20 ĝis la h. 20,25 (M.E.T.) - Ondoj: metroj 39,11 = 7670 kc/s. kaj metroj 41,35 = 7255 kc/s
La disaŭdigo estas ripetata la saman tagon de la h. 23,30 ĝis la h. 23,55 (M.E.T.)
Ondoj: 30,93 m.= 9700 kc/s - 39,11 m.= 7670 kc/s. kaj 41,35 m.= kc/s.
En niaj disaŭdigoj vi povas aŭdi: novaĵojn, komentariojn pri enlandaj kaj eksterlandaj demandoj, raportaĵojn kaj prelegojn pri la ekonomia kaj la kultura vivo en Bulgario, bulgaran popolmuzikon, kaj ĉiun unuan dimanĉon de la monato, nian "Poŝtkeston"

KORESPONDPETO: Esperanta Klubo en Usono serĉas korespondadon por siaj klubanoj (ankaŭ infanoj). Skribu al: S-ino Catherine Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, California U.S.A.

SALTO TRA JARCENTOJ, BELA KAJ KOMFORTA, SEI WEISE-REISE
Tri reklamiloj, tute en Esperanto, de la Germana Federacia Fervojo, kiuj senkoste estas haveblaj per la eldonisto "Bundesbahn - Werbeambt" Frankfurt Main, aŭ per la Germana Esperanta Fervojista Asocio Frankfurt (Main) Karlstrasse 4-6